


la Espero

1990:3

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN



LA SVEDA
ESPERANTO-
KONGRESO
EN KARLSKOGA
IDEALA LAŬ
LABOR-
KONDIĈOJ,
PROGRAMO,
DISKUTOJ
(KAJ VETERO)



SURPRIZAJ
KAJ ĜUINDAJ
ARTISTOJ
EN KEF 3 EN
VÄSTERÅS, LA
TRIA KULTURA
ESPERANTO-
FESTIVALO
ARANĜITA
DE SEJU

ANONCETOJ

Cimpaye A Thomas estas 28-jara maŝinpresisto, kiu loĝas kun sia juna familio en vilaĝo en okcidenta Tanzanio. Li estas prezidanto de la klubo en Mpanda kaj deziras korespondi kun amikoj en la tuta mondo. Skribu al: Cimpaye A Thomas, SLP 484, Mpanda, Tanzanio.

Fondigis Rumana Esperanto-Asocio, C.P. 37-146, Bucuresti, Rumanio. Ĝi bezonas helpon. Aŭ mem sendu librojn, revuojn ktp aŭ donacu monon al UEA. (Sveda poŝtĝirkonto 74374-0) Sur la enpagilo indiku "Rumanio".

Deziras korespondi, interŝanĝi poŝtmarkojn ktp: Agustinus Itandje, Centre Emission Radiotélégraphie, T.S.F. P.T.T., DLA New Bell, Kameruno.

DONACOJ

Karl-Gösta Lundgren, Motala 100.
Leif Nordenstorm, Luleå 700.
Ove Seltmann, Stockholm 200.
Claes-Göran Ingestedt, Vällingby 300.
Margit Rudolphson, Karlshamn 100.
Edla Nilssons dödsbo, Malmberget 58796.

Klubo cent: Hässleholms esperantoklubb 100.
Tore Gustavsson, Skövde 100.
Ljungby esperantoklubb 100.
Britta Lindeberg, Malmö 100.
Leif Nordenstorm, Luleå 100.

Memore al Karl-Olof Sandgren: Anna Sandgren, Östansjö 10000.

Memore al Gösta Ljunggren: Britta Lindeberg, Malmö 100

La donacoj, precipe la du grandaj grandskale plibonigis la ekonomion de SEF. Edla Nilsson testamentis 70790 kronojn al SEF. La loka tribunalo forprenis 11994 kronojn kiel imposton. SEF tamen klopodos klarigi al la tribunalo ke idealisma organizaĵo kiel SEF ne devas pagi imposton.

SEF kore dankas pro la donacoj. Novaj kontribuoj estas bonvenaj al Svenska esperantoforbund, poŝtĝiro 2012-3

La Espero

Organ för Svenska Esperantoforbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Redaktör: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Sättning: Per Aarne Fritzon och Leif Nordenstorm

Utformning: Franko Luin/Omnibus

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1990

Esperantoforbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Öppetider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11 - 13 och 17.30 - 19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoforbundet

Medlemsavgift 1990: Direktansluten medlem 125 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 50 kr.

Enbart prenumeration: 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr. Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisternas Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589-155 31 (Nordiskt samarbete)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Tolsered Pl. 2265, 425 90 Hisingskärra, tel. 031-57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91 (kansliet, massmedier)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-122 05 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Röhdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491-204 61 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Bertil Andréasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-17 36 87 (intern.org.)

Suppleant: Per Aarne Fritzon, Möregatan 9, II, 116 27 Stockholm, tel. 08 - 40 88 92

Suppleant: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Öppetider: 1 september - 15 maj: onsdagar 10 - 11, torsdagar 17 - 18. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson.

Enhavo

- 36 SEF-KONGRESO
143 kongresanoj el kvin landoj en
suna, enhavoriĉa SEF-kongreso
Espero pri radiokurso, instruista
agado, pli bona ekonomio
Post la kongreso
- 39 SEJU
Jarkunveno de SEJU
Övernatta gratis
- 40 KEF 3
Inspiriga kulturfestivalo
Pensoj post KEF 3
- 42 Normanaj kaj vikingoj
Ellemu esperanton!
Esperanto eller esperanto?
- 43 RECENZOJ
La etimologia vortaro estas
eldona atuto
Du novaj lernolibroj por svedoj
Ture Sventon en Londono
"Vivu Esperantujo"
- 45 TRA LA LANDO
Vizito el Germana DR
Nova sveda poemaro
Libroj en esperanto
Vigla laboro en Malmö
La loterioj tre sukcesaj
Prelegoj pri Pollando
Eldona Societo jarkunvenis
- 46 TRA LA MONDO
Moskovskie novosti
Tre ĉars korrespondens studier
Asocio por religia historio
- 46 Nekrologo: Kurt Lindström
- 47 Plezurul' dancas gavoton kun la
kvinn sentumoj
Interna kvalitaltigo estas la vojo!

Prezidanto:

Kongreso en hejmeca atmosfero!

Nia 84-a kongreso certe restas en memoro de ĉiuj partoprenantoj kiel enhavoriĉa kaj agrabla kongreso. Aldona kaŭzo estas certe inter alie ke kunvenejo, manĝejo kaj loĝejo estas en la sama loko – tre komforte por la kongresanoj – kaj la ekvilibra miksaĵo de laboro kaj amuzo. Speciale ĝojige estis, ke okazis samtempe jarkunsidoj de la aliaj esperanto-organizaĵoj.

La eta loka kongresa komitato, konsistanta el unuopaj esperantistoj de Karlskoga (ne ekzistas klubo tie) kaj gelemantoj en la esperanto-kursoj kun Lars Forsman kiel "ĉefo", bonege plenumis sian taskon aranĝi nian kongreson.

Kiam mi laboris kun Lars pri la preparo de la kongreso mi rimarkis ke liaj gelemantoj fariĝis tre enmiksitaj. Ekzemplo estas Sven-Erik Stiernman, kiu restis unu semajnon post la kursfino por helpi aranĝi la

kongreson. Unu el la ĉarmaj "trifolioj", kiu ne partoprenis esperanto-kurson, tamen lernis la esperanto-kantojn kaj ĉiuj tri restis por amuzi nin.

Mi aŭdis ankaŭ, ke multaj liaj gelemantoj poste kun entuziasmo kaj lerteco instruas esperanton kaj laboras por ĝi en siaj lokoj. Kelkaj admonis la estraranojn de SEF streĉe agi por la daŭrigo de tiuj kursoj, ĉar ili signifas multe por la evoluo de esperanto en Svedio. Ni estas konsciaj pri la graveco de tiuj kursoj kaj niavice admonas ĉiujn esperantistojn reklami por ili. Kial ne mem partopreni?

Osmo Buller diris en sia prelego, ke nur perfektaj esperantoparolantoj povas informi pri esperanto. Mi ne tute samopinias kun li. En Svedio estas multaj kiuj ne tute regas la lingvon, sed tamen efike informas pri esperanto.

Sed por la propra kontentigo uzu la someron por pliperfektigian esperanton – partoprenu kursojn kaj aranĝojn, legu librojn kaj gazetojn. Vi samtempe informiĝos pri kio okazas.

Mi deziras al vi ĉiuj membroj bonan someron.

Karin Lindquist



143 kongresanoj el kvin landoj en suna, enhavoriĉa SEF-kongreso

"Karlskogan invadas ĉi-jare amaso de gaja popol' ..."

Tiel kantis "nia" trobadoro Roland von Malmberg antaŭ sia gurado dum la interkona vespero en la SEF-kongreso. 143 tiaj gajaj partoprenantoj kolektiĝis – kaj fakte ne nur el Svedio sed ankaŭ el Finnlando, Estonio, GDR kaj Hungario.

Gajaj ili havis kaŭzon esti. Ĉiuj kongresaj cirkonstancoj estis tre favoraj. La popolaltnleĵo estas jam de longe konata en Esperantujo pro siaj kursoj. Lars Forsman estas lerta organizanto. Li kolektis ĉirkaŭ si diligentan aron da kunlaborantoj. Aldonu al ĉiuj tiuj faktoj, ke la suno brilis kaj mildaj antaŭsomeraĵoj ventoj karesis nin – do kio mankis?

Pupteatra surprizo

Kio frapis unue la okulojn de la alvenintaj kongresanoj? Jes, en la akcepteja halo longa tabulo kun nenombreblaj gazeteltondaĵoj, kiuj pruvis kiel lerte la klubo "Eko" en Karlskoga informis pri la lingvo.

Post inspekto de la loĝejoj en ĉarmaj pavilonoj, oni povis komenci la kongresan vivon antaŭ pupteatra

tro. Ĝi priskribis detalojn en la vivo de Zamenhof. Lars Forsman skribis la tekston, Ann-Sofie Robinson reĝisoris kaj Ivar Trane en Danlando aranĝis la scenejajn bildojn kaj figurojn. Bela surprizo de "Eko" – kiu certe donos plian eĥon...

Tri estonaj gastoj

Lars Forsman prezentis komence de la interkona vespero la knabinan triopon "Tri Folioj", kiu bele kantis ne nur dum tiu vespero sed ankaŭ sabate vespere.

Poste estis tempo prezenti la tri estonajn gastojn Edda Marike Pelt, Ruti Kamla kaj Neeme Suur. Ili muzikis kaj kantis – ne nur estonajn popolkantojn, sed ankaŭ, speciale lernitan por la kongreso, "Muzikantojn el Skaraborg"!

La estonoj esprimis sian grandan ĝojon havi eblecon viziti Svedion kaj invitis svedajn esperantistojn al sia lando. Edda Pelt rakontis al la raportinto de tiu ĉi artikolo, ke ŝi kelkajn tagojn antaŭ la forveturo al Svedio partoprenis la faman defendadon de la estona parlamento kontraŭ la rusamikaj grupoj.

Thore Skogman en Esperanto

Lars Forsman povis prezenti sonbendon kun Esperanto-kanto de Thore Skogman. Lars tutsimple skribis al li peton – kaj tuj estis preta afero, kun perfekta prononco, kvankam Thore nur "papage" lernis la vortojn.

Komencas fariĝi kara tradicio, ke Roland von Malmberg donas amuzon al niaj kongresoj. Grandaj estis la aplaŭdoj kaj la ridoj pri liaj pli aŭ malpli frenezaj kapricoj. Sed fine ankaŭ li turnis sian animon pli serioze, kantante pri paco. Li ankaŭ rakontis pri vizito en packonferenco en Moskvo, kiu uzis 90 procentojn de la kostoj por tradukistoj...

Idebanko por kluboj

Frue sabate kunvenis svedaj sekcioj de ILE, IFEF kaj KELI. Espereble ili mem raportas same kiel Eldona Societo.

Estis ankaŭ kunveno de regionaj respondeculoj. Ili vigle diskutis. Ni notis, ke Birger Viggen proponis ian "idebankon" por la kluboj, ke Haldo Vedin atentigis la esperantistojn aktiviĝi en la laboro de UN-kluboj, Amnestio Internacia, media movado ktp, kaj ke kelkaj parolantoj memorigis nin pri la bonaj eblecoj labori interbahaanoj, kiuj havas internacian lingvon en sia programo.

Infankongreseto!

La granda sabata okazintaĵo tradicie estas la jarkunveno de SEF, pri kiu ni raportas en aparta artikolo. Sed antaŭ ĝi la kongreso solene malfermiĝis. Ulrika Sjögren kantis belan himnon, Lars Forsman bonvenigis kaj SEF-prezidanto Karin Lindqvist esprimis la ĝojon de ĉiuj esti en la "lingva Esperanto-centro de Svedio". Ŝi rakontis, ke por la unua fojo estis infankongreseto en la kadro de SEF-kongreso. Berit Posthuma, Kajsa Larsson kaj Inga



Edda Marike Pelt, Ruti Kamla kaj Neeme Suur el Estonio kantas.
Fotis: B. Lindqvist



Grupeto "Trifolij" kantas en esperanto. Ĉiuj tri estas lemantinoj ĉe la popolaltilermejo. Fotis: U Luin

Johansson prizorgis ses infanojn en ĝi.

Vicprezidanto de urba konsilantaro Gunnel Forsberg parolis por la komunumo kaj rektoro Ingmar Gustavsson por la altlermejo – la lasta fakte en Esperanto, ĉar Anna Alamo-Sandgren iam instruis al li la lingvon.

Ankaŭ la estonaj gastoj "internaciigis" la bonvensalutojn kaj transdonis estonajn pupojn.

Osmo Buller informis

Rimarkinda gasto dum la kongreso estis Osmo Buller, ĝenerala sekretario de UEA. Li parolis sabate pri la taskoj de UEA kaj dimanĉe pri Esperanto-informado.

Grava por UEA estas la membrovarba kampanjo, li diris. Jam de jardekoj la membronombro restas sama, cirklo rompenda. La nova politika libereco de orienteŭropaj landoj donas esperon pri altiĝo de membronombro. Aliflanke estas ankaŭ negativaj signoj tie. Ekzemple en Pollando la cifero de asociaj membroj draste falis. Pri la situacio en la baltaj landoj Osmo Buller jetis la demandon, ĉu nordiaj esperantistoj povus helpi siajn kolegojn tie.

Aŭkcio por vortaro

La komunumo de Karlskoga regalis la tutan kongreson per agrabla supeo en restoracio Alfred Nobel. La etoson altigis tre miksita progra-

mo kaj dancado. Interalie veterano de la estinta Esperantoklubo en Karlskoga, Sune Ahlm, rakontis memorojn. Edith Ulmer donis orientgermanajn impresojn.

Diservo, en kiu predikis Gustav Stenholm, kaj aŭkcio apartenis al la dimanĉa programo. La tuta aŭkcia gajno, 3.270 kronoj, iras al la laboro por la nova vortaro. Kiel kutime Torsten Lundh tre, tre lerte kaj sperte gvidis la gajan aŭkcion.

Kiam ni parolas pri monsumoj, ni povas ankaŭ raporti, ke Franko Luin, Ingmar Nordin kaj iliaj helpantoj vendis librojn por 5.235 kronoj kaj informmaterialon por 629 kronoj. "Lotdirektoro" Lennart Svensson vendis restantan stokon de la dua Esperanto-loterio por 3.400 kronoj.

En Göteborg 1991

– Perfekta loko por kongreso! estis la finkonkludo de SEF-prezidanto Karin Lindqvist dum la solena fermo. Lars Forsman faris "gigantan laboron", kaj laŭdindaj estas ankaŭ liaj helpantoj Monika Forsman, Sven-Erik Stjernman, Sten Berggren kaj Adina Giselson.

Memordonacojn ricevis la estonaj gastoj kaj la orientgermana Edith Ulmer. Osmo Buller jam frue estis memorigita. La klubo "Eko", ricevis standardon.

Vicprezidanto Märtha Andreasson informis, ke venonta kongreso estos en Göteborg, kaj Inga Johansson el tiu urbo bonvensalutis tien. Lars Forsman simbole transdonis la kongresan flagon al ŝi kaj finis la kongreson per deziro al ĉiuj pri "verda somero".

Börje Andersson



Roland von Malborg denove ĝuigis la kongresanojn per sia esperanta-sveda programo, kiu konsistas el kantoj, skeĉoj kaj diversaj klaŭnaĵoj laŭ tute persona stilo. Fotis: B. Lindqvist

Espero pri radiokurso, instruista agado, pli bona ekonomio

Reprezentantoj de 30 kluboj, distriktoj kaj organizoj ĉeestis la SEF-jarkunvenon kun aliaj individuaj membroj. Roland Lindblom bonhumore gvidis la glate kurantan traktadon de 17 kunvenpunktoj, helpata de Gunilla Sundholm kiel sekretario.

Komence Karin Lindqvist informis, ke la kontaktoj kun la sveda edukradio donas esperon, ke eble en 1992 estos radiokurso de Esperanto. Dumtempe estus bone, se ĉiuj laboros por lokaj elsendoj.

La jarraporto konkludis, ke la klubaj aktivaj estis multaj kaj variaj. Pluraj utiligis la eksterlandajn prelegantojn por bone informi. Ekde 1988 ĝis nun, 120 lernantoj estis instruitaj en la popolaltlernejo de Karlskoga. Lars Forsman partoprenis en diskutprogramo en TV 3. La nordia kunlaboro progresas.

Pli bona ekonomio

Danke al pli bona ekonomia situacio ni nun povas pli efike labori por trejnado de Esperanto-instruistoj kaj informado al lernejoj. La ekonomio vere multe pliboniĝis. La enspezoj estis je 46.496 kronoj pli altaj ol la elspezoj! Tio rezultas pleje de multaj kaj kelkfoje tre grandaj donacoj, sed unuavice tamen de la profito post la lotvendado, sume 47.493 kronoj. La jarraporto esprimis specialan dankon al la energia lotienestro Lennart Svensson.

En la jarŝanĝo SEF havis propran kapitalon de 167.711 kronoj. Sed la membronombro malkreskis per 60 al 1301.

Agadplano

Karin Lindqvist estis unuanime reelektita prezidanto por unu jaro. Tri estraranoj servis dujaran periodon, kaj ĉiuj tri, Märtha Andreasson, Ulla Luin kaj Haldo Vedin, estis reelektitaj por novaj du jaroj. Same estis por anstataŭanto Leif Nordenstorm kaj revizoroj Åke

Blomberg kaj Bertil Bengtsson.

La membrokotizoj restos la samaj. Buĝeto je 234.000 kronoj kaj agadplano estis ambaŭ aprobitaj. La lasta antaŭvidas i.a. kursojn por instruistoj en Karlskoga kaj por studgvidantoj en Kungälv. Esperanto estos prezentita en kelkaj altlernejoj por instruistoj. Du aŭ tri turneoj estas planitaj.

Petu stipendion!

El ok proponoj al la jarkunveno, ses venis el la klubo en Upplands Väsby, kiu denove montris sian riĉon de ideoj.

La eterna demando pri la multekosta Esperanto-Centro revenis en unu propono. La klubo aŭ kluboj en Stokholmo nun ekhavis la taskon serĉi taŭgan ejon.

Oni ne starigos specialan stipendifunduson, sed membroj povas peti monon el la ĝenerala SEF-kaso.

Same kiel Upplands Väsby, ankaŭ Lennart Svensson faris proponon pri radio kaj televido. La respondo estis, ke radio kaj televido nur pretas prezenti absolute profe-

sie faritajn programojn. SEF tute ne havas tian kompetentecon kaj tial ne povas produkti lingvokurson aŭ informprogramojn por tiuj amaskomunikiloj. Sed la edukradio deklaris sin preta mem produkti tiajn programojn kun nia helpo. La altlernejo en Karlskoga akceptis filmadon dum aranĝoj tie.

La klubo de Stokholmo havis proponon pri turistinforma materialo. La respondo estis, ke la jarlibro de UEA indikas, en kiuj urboj troviĝas turistbroŝuroj. La respondecon novigi tiun materialon devas havi la kluboj mem.

Ingemar Nordin honora membro

La jarkunveno decidis elekti Ingemar Nordin honora membro pro liaj grandaj laboroj por Esperanto, i.a. pri la tre populara korespondakurso.

La prezidanto alvokis la tutan estraron al la podio por danki ilin kaj precipe menciis la grandegan laboron de sekretario Ulla Luin.

Börje Andersson



Pupteatra prezento pri la vivo de Zamenhof estis por ĉiuj agrabla komenco de la kongresaj tagoj. Fotis. B. Lindqvist



Osmo Buller, ĝenerala sekretario de UEA, prelegis pri informado.

SEJU

Jarkunveno de SEJU

La 19-an de majo SEJU jarkunvenis kadre de la kongreso de Sveda Esperanto-Federacio. La jarkunveno partoprenis deko da personoj.

Oni elektis estraron kun la jena konsisto:

Lena Månsson, Stockholm (prezidanto)

Heléne Brännmo, Sundsvall

Lorena Diaz Gallardo, Östersund

Kajsa Larsson, Stockholm

Camilla Persson, Hallsberg

Berit Posthuma, Stockholm

Malin Söderback, Växjö

Anstataŭantoj: Gabriella Sandström, Visby, kaj Keiko Snarberg, Jönköping.

La du anstataŭantojn oni bonvenigis kiel tute novajn kunlaborantojn en la estraro.

Post la elektoj okazis ĝenerala diskuto pri la estonta agado – i.a. renkontiĝoj en Barnens Ö kaj Gotenburgo, progresiga kurso semajnfina, produktado de informmaterialo pri SEJU, intersanĝa kunlabo-

ro kun orienteŭropaj landoj, IJK en 1991 (okazonta en Karlskoga) ktp.

Lena Månsson

Övernatta gratis

Som turist i ett främmande land är man van att antingen vallas runt av en guide eller att försöka klara sig på egen hand så gott det går. Inom esperantorörelsen finns ett tredje alternativ. Det kallas *Pasporta servo*. Pasporta servo är en adressbok med 700 adresser i 53 länder, adresser till esperantister som vill ta emot gäster från andra länder i sina hem, oftast gratis.

Villkoret för att man skall kunna använda denna gästfrihet, är att man talar esperanto, och att man har ett exemplar av boken *Pasporta servo*. Den brukar kosta kring 25 kronor. Priset på årets upplaga var ännu inte bestämt när *La Espero* trycktes. Den kan beställas från:

Sara Török, Stamtgatan 56,
125 39 Älvsjö, tel 08-722 92 91
eller från EsperantoCentro.

Post la kongreso

Dankegon al ĉiuj esperantistoj, kiuj partoprenis la jarkongreson en nia "Popola" Altlernejo de Karlskoga. Ni tre intense laboris por ĝi, sed vere ĝuis havi tiom da afablaj kongresanoj ĉi tie. Nun vi konas la ejojn kaj eble revenos aŭ povas rekomendi al iu partopreni kurson.

Tri lokaj ĵurnaloj skribis bonegajn artikolojn pri la kongreso kaj poste oni intervjuis min en la Varmlanda Radio pri Esperanto kaj la okazaĵoj dum la kongreso. En la sama programo kantis Thore Skogman sian "Esperanto, Esperanto", kiun vi mem povis aŭskulti dum la interkona vespero. Du tagojn poste oni invitis min al du latinklasoj en la gimnazio de Hallsberg, kie la 50 gelernantoj montris grandegan intereson.

Nun atendas laboro pri la some-
ra kurso ĉi tie la 9-an ĝis 14-a de julio. Jam aliĝis multaj, ankaŭ eksterlandanoj. Ni ĝojas havi la redaktoron de la radiprogramo "Vetandets Värld", Bertil Forsman, inter la partoprenantoj. Ili volas i.a. fari kelkajn intervjuojn kaj prilabori kelkajn radiprogramojn. La kursojn gvidos almenaŭ tri instruistoj: Georgo Handzlik el Pollando, kiu ankaŭ tre bone kantas esperante, Andreo Pettyn, tre konata esperantisto de la pola Esperantoradio, kaj mi mem gvidos, kiel kutime, la komencantojn. Eble venos ankoraŭ kvara instruisto.

Mi dankas kaj ĝisas vin ĉiujn.

Lars Forsman



Du el la estraranoj de SEJU: Kajsa Larsson (maldekstre) kaj Berit Posthuma. Fotis: U Luin

Inspiriga kulturfestivalo en Västerås



Nataša kaj Jomart promenante en Västerås. Iliaj kantoj estas jam konataj inter esperantistoj en Sovetunio. Fotis: U Luin

La kvalito de la esperantaj kantoj estas pli alta, kaj la kvalito de teatraj prezentoj en esperanto ekhavas pli da profesieco. Jen la plej gravaj konkludoj post la kultura festivalo, kiu okazis en Västerås en majo 1990.

Jomart kaj Nataša el fora parto de Sovetunio estas la programero kiu plej impresis dum la festivalo en Västerås. Jomart venas el Kazahio, kaj liaj kantoj temas pri amo, longa atendado pri mallonga somero kiu donas renkontiĝojn, sopiro. La tekstoj estas verkitaj kun sentemo ne nur pri la malfacila temo de sopiro kaj amo, sed ankaŭ kun sentemo pri la lingvo esperanto. La muziko estas molaj kaj iom melankoliaj melodioj kiuj sekvas la lingvan ritmon de la tekstoj. La du kantistoj havas bonan konon pri muziko, kaj la gitaro de Jomart sekvas ilin tre gentile.


Nataša havas pli sekuran voĉon en la kantoj, kaj ŝi grave kontribuas al la tre simpatia impresio de la duopo.

Alia duopo, ankaŭ el Sovetunio, konfirmas la impreson ke la pli bonaj kontaktoj inter oriento kaj

okcidento de Eŭropo pliriĝigos la okcidentan esperantan kulturon. Oksana kaj Vladimir, kiuj parte restadis en Svedio dum la pasinta vintro, havas vastan konon pri popolmuziko el diversaj tradicioj de tiu grandega ŝtato, kaj krom tio ankaŭ mem verkas esperantaj kantojn laŭ simila stilo. Ili rakontis kaj instruis en facila kaj alloga maniero.

Profesia teatro

Jerzy Fomal el Pollando estas jam konata en multaj el la svedaj esperantoklubo pro siaj prezentoj de unupersonaj teatraĵoj. En la kulturfestivalo li prezentis *Einstein*, kun teksto verkita de Gunnar Gällmo, kaj *Eduko danĝera* kun teksto de Harry Brown. Li ankaŭ faris prezenton nomata *Tajdoj de l'vivo*, kiu konsistas el du monologoj de diversaj aŭtoroj, ambaŭ kun drinkemulo kiel ĉefpersono. En vespero li faris kroman prezenton de komikaĵo, en kiu li utiligis ŝirmilon por fari sekunde rapidajn ŝanĝojn de vestaĵoj por ludi plurajn rolojn. La teatraj objektoj kiujn li devas kunporti dum siaj vojaĝoj estas tre bone elpensitaj, kaj li donas tre diversajn



Vladimir kaj Oksana instruis novajn kantojn al la partoprenantoj kaj prelegis pri muziko inter la sovetaj esperantistoj. Fotis: U Luin



Jerzy Fomal kaj Zofia Banet-Fomalowa ambaŭ kontribuis al la festivala programo: Jerzy per pluraj unupersonaj teatraĵoj, Zofia per prelego. Fotis: U Luin

etosojn en siaj prezentoj kun malmulte da objektoj.

La grupo Interateliero el Leningrado ankaŭ estas rimarkeble profesia. Oleg Popkov donis prezenton de *La sonĝo de ridinda homo*, tradukita verko de Dostojevskij, kun tre serioza enhavo pri vivo kaj morto kaj homaj rilatoj sur la tero. Ĝi temas pri viro, kiu kredas ke li estas ridinda, kaj decidis mortigi sin mem, sed malgranda knabino malhelpis al li, kiam ŝi petis, ke li helpu ŝin. Tiu malgranda knabino, kiu petas helpon por sia patrino, eble restas pli en la memoro ol la viro mem, kvankam la knabino ja tute ne estis sur la teatra sceno.

Du tagojn poste, la sama aktoro estis unu el du klaŭnoj, kiuj faris mirindan komikaĵon portante verdajn krokodilojn, *Dodo kaj Ĉuĉo klaŭncertas*. Se oni volas, oni povas trovi seriozan memkritikon al la esperantismo sub la amuzoj. Unua klaŭno diras al la dua, ke la bankuvo sur la scenejo estas la Balta maro, sed la dua klaŭno ne tuj volas kredition. Nur post minacoj, la dua klaŭno donas la "ĝustajn" respondojn al vico da demandoj, kiu finiĝas "Ĉu vi kredas ke vi estas esperantisto?" – "Jes." – "Ĉu nun vi kredas ke tio estas la Balta maro?" – "Jes!"

Teatro Krizalido konsistas el *Solene Gaspard*, kiu prezentis *Meluzina la granda feino*, kaj du helpan-

toj. La teksto, kiun ŝi mem verkis samtempe en la franca kaj en esperanto, baziĝas sur mezepoka rakonto, kiu siavice povas esti eĉ pli malnova. La feino estas severe punata de sia patrino, kaj ŝi devas ĉiam kaŝi sian veran personecon kiam ŝi fariĝas edzino de nobelulo. La prezento funkciis pro la personeco de Solene, kune kun la belaj vestaĵoj, muziko kaj danco de la kunludantoj.

Iaspeca teatro estis ankaŭ la prezento de *Jarlo Martelmonto (Jarl Hammarberg)*, kiu voĉlegis konkretan poezion, kiu uzas la melodion de la lingvo ĝis tia grado ke ĝi estas muziko kaj ne enhavo. Li kombinition kun moviĝantaj kubo kun fortaj koloroj, tiel ke la bildo de la sceno konstante ŝanĝiĝis.

Rokmuziko kaj talentuloj

Al la junaj partoprenantoj plej plaĉis la du rokmuzikaj prezentoj, unue la sveda rokbando *Persone*, kaj poste la sved-franca rokbando *Amplifiki*. Interesa estis kompreneble ankaŭ la talenta vespero, kiu fariĝis talenta nokto, pro tio ke en ĝi aperas multaj el la "ordinaraj" membroj de la esperantomovado. Pluraj el ili meritis profesion helpon por finpoluri siajn verkojn kaj konatigi ilin al pli granda publiko.

La festivalo estis aranĝita de la grupo Ranetoj, junulara grupo en la

stokholma regiono, kaj ili sukcesis fari ion tre kvalitan kun minimumaj ekonomiaj rimedoj. La esperantoklubo de Västerås faris la lokajn aranĝojn, kaj la komunumestro *Sven Engvall* inaŭguris la festivalon. Ĝi okazis en renovigita bierfarejo, tre taŭga ejo por tiaspecaj aranĝoj, pri kiu la urbo de Västerås povas fieri.

Ulla Luin

Pensoj post KEF 3

La tria KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) estis same sukcesa kiel la du antaŭaj. Tion mi kuraĝas diri, kvankam mi mem estis parto de la organiza stabo de KEF 1 kaj 2. Montriĝis dum la "kritika rondo" en KEF 3, ke la publiko preskaŭ nur volis laŭdi, eĉ laŭdegi, kaj ne plendis pri la aranĝo.

Malgraŭ la antaŭaj sukcesoj, KEF 3 kolektis nur ĉ. 90 personojn (partoprenantoj, artistoj, organizantoj) entute – sammulte kiel en KEF 1 kaj eĉ malpli ol KEF 2.

Estas embarase kaj oni sentas ian honton, kiam foje venas nur 30 spektantoj al iu prezento aŭ prelego, sed tio estas natura rezulto de tiel relative malgranda publiko. Kiel mi jam menciis, pluraj en la tuta KEF-anaro estas organizantoj aŭ artistoj. Dum iu artisto faras sian prezenton, tiuj eble okupiĝas pri aliaj aferoj.

Ĉiuj ĉi artistoj vere meritas havi pli grandan publikon kaj la eblecon prezenti pli ofte sian arton. La muziko devus esti registrita kaj eldonata en diskoj kaj kasedoj.

La demando, kiu vekigis en mia kapo post KEF 3 kaj al kiu mi invitas la legantojn debati estas: Ĉu Esperantujo estas sufiĉe granda por havi propran kulturon?

Börje Lund

Normanoj kaj vikingoj

En tiu ĉi jaro ekzistas tri kialoj diskuti pri Normanoj (*nordmän*) kaj vikingoj (*vikingar*). Aperis en esperanto "Orm la ruĝa", la fama romano pri la vikingo Orm. Aperis ok svedaj poŝtmarkoj pri vikingoj, kiujn oni povas sendi al korespondantoj kun priskriboj. Krom tio, ĉiujare multaj esperantistoj gastigas eksterlandanojn, al kiuj oni montras historiajn vidindaĵojn, ankaŭ el la vikinga periodo.

Normanoj estis la tuta loĝantaro de Skandinavio en la vikinga periodo (*vikingatiden*), 800–1050 pK, kiu konsistas el la fino de la fer-epoko (*jämåldern*) kaj la komenco de la mezepoko (*medeltiden*). Kelkaj normanoj fariĝis vikingoj. Kelkaj vikingoj estis rabistoj (*rövare*). Tio validas ĉefe por okcidenta Eŭropo. En orienta Eŭropo, svedaj vikingoj plej ofte estis pacaj komercistoj. Multaj vikingoj elmigris (*utvandra-de*) al aliaj landoj: Anglio, Skotlando, Irlando, Normandio – kiu ricevis sian nomon pro la Normanoj –

Ruslando, Islando, Groenlando kaj aliaj. Tiel la vikingoj influis tutan Eŭropon.

La urbeto Birka sur la insulo Björkö en Mälaren konsistis el malgrandaj lignaj dometoj. La granda nombro de trovitaj valoraĵoj tamen montras ke Birka estis riĉa komerca centro. Al tiu urbo venis la misiisto Ansgar en 829. Dum pli ol 250 jaroj en Svedio tamen estis du religioj: la praskandinava kaj la kristana. Dum tiu ĉi tempo multaj normanoj eĉ miksis ambaŭ religiojn, kiel vi povas legi en Orm la ruĝa.

Inter la arkeologiaj restaĵoj de la vikinga periodo vi eble montrus al viaj eksterlandaj gastoj ŝipajn tombojn (*båtgravar*), runŝtonojn (*runstenar*), praremparojn (*fornborgar*). Tamen ne diru al viaj gastoj ke la vikingoj portis kaskojn (*hjälm*) kun kornoj, ĉar tio ne estas vera.

Legu pri la vikingoj en "Orm la ruĝa" kaj en "Islandaj pravoĉoj".

Leif Nordenstorm

POR KOMENCANTOJ

Ellernu esperanton!

Tre grava problemo en la esperanto-movado, estas ke ekzistas tre multaj bonan-tagon-esperantistoj, Tiuj nomas sin esperantistoj, sed nur iom-ete parolas esperanton. Multaj el ili estis esperantistoj dum jardekoj, kaj vizitis multajn internaciajn kongresojn, sed tamen malbone parolas la lingvon.

Ĉiuj bonan-tagon-esperantistoj nuntempe havas multajn eblecojn (*möjligheter*) el-lerni (*lära så man kan*) esperanton. En La Espero 1990:2, sur paĝo 2 vi povis legi pri kursoj dum la somero kaj aŭtuno. La kursoj estas por homoj en ĉiuj aĝoj. Ne maltrafu la eblecojn. Se vi estis bonan-tagon-esperantisto

dum jardekoj, kaj nun estas pensulo, vi ja havas eblecon studi dum unu aŭ pluraj semajnoj. Se vi ĵus finis gimnazion, kelkaj semajnoj en la Popola altlernejo en Karlskoga estus ne-forges-ebla tra-viv-aĵo (*oförglömlig upplevelse*).

Se vi laboras, povas esti malfacile foresti dum ok semajnoj por tuta duon-semestra (*halvtermins-*) kurso en Karlskoga. Por vi ekzistas multaj someraj kursoj.

Kiam vi ellernis esperanton, vi povos utiligi (*ha nytta av*) la lingvon des pli bone: dum vojaĝoj, por legi librojn por korespondi.

Leif Nordenstorm

Esperanto eller esperanto

Eugen Rytenberg i Uppsala har påpekat att ordet 'esperanto' ofta stavas med liten bokstav i *La Espero*, fast det bör vara stor. Det ger oss tillfälle att utreda hur ordet 'esperanto' bör stavas.

Vad gäller svenska texter är svaret enkelt. Man skriver 'esperanto' med liten bokstav, eftersom det inte är ett egenamn..

I texter på esperanto brukar man för det mesta skriva 'Esperanto' med stor bokstav eftersom språkets namn från början är en pseudonym för Lazar Ludvik Zamenhof, och detta var ett egenamn. Såväl *Plena Ilustrita Vortaro* som *Plena Analiza Gramatiko* skriver 'esperanto' med stor bokstav.

Under senare år har det dock blivit vanligare att skriva 'esperanto' med liten bokstav även på esperanto. Så gör bl a kulturtidskriften *Literatura Foiro*. *La Espero* tillåter båda sätten. Framtiden får utvisa vilket sätt som kommer att leva vidare.

Leif Nordenstorm

Köp böckerna på Esperantoförlaget

Brunnsgatan 21
111 38 Stockholm

<i>Grodan</i>	73 kr
<i>Lernu esperanton nun!</i>	55 kr
<i>Etimologia vortaro</i>	80 kr
<i>Ture Sventon en Londono</i>	73 kr

La etimologia vortaro estas eldona atuto

Ebbe Vilborg. *Etimologia Vortaro de Esperanto. Volumo 1: A-D. Eldona Societo Esperanto, Malmö 1989. 104 p. 80 kr.*

Ĉiujare organizaĵo en Esperantujo aranĝas konkurson por La Verko de La Jaro; temas nur pri beletraĵoj en la proza kaj poezia ĝenroj. Se estus simila konkurso por elekti la plej valoran nefikcian verkon de la jaro 1989 - mi pensas pri faklibroj, vortaroj kaj alispecaj konsultlibroj - mi senrezerve kandidatigus *Etimologia Vortaro de Esperanto (EVE)* por tiu honoro. Pravigi mian elekton ja estus facile, ĉar ĝi estas unika publikaĵo sur la tereno de esperantologio. Ĝis nun ne ekzistis samspeca konsultlibro, kvankam -interesiĝantoj pri etimologiaj demandoj sporade kaj dise aperigis artikolojn kaj studaĵojn dum pluraj jardekoj.

Estas vere, ke antaŭe okazis provoj kompili etimologian vortaron de Esperanto, sed tiuj entreprenoj neniel atingis la nivelon de EVE. En 1907 estis publikigita *Naŭlingva Etimologia Leksikono* de Louis Bastien. La dua eldono de 1950 enhavas proks. 5000 vortojn sed ĝi ne estas kompleta, ĉar mankas kelkaj oficialaj vortoj kaj la gramatikaj elementoj. Malgraŭ la titolo, tiu verko ne estas vera etimologia vortaro sed nur listo de Esperantaj vortoj, akompanataj en paralelaj kolumnoj de komparaj vortoj aŭ pro komuna deveno aŭ rezulte de depruntado de la sama fonlingvo. La plej riproĉenda aspekto de la kompilaĵo de Bastien estas, ke ĝia registrad-sistemo ne indikas en neambigua maniero la etimon, kiu estas la fonto de la Esperanta vorto. Sekve, ĝi ne dokumentas la historiojn de unuopaj vortoj en Esperanto sed havas nur praktikan valoron por montri, kiun lokon okupas Esperanto "internacie" en komparo kun la ĉefaj lingvoj de Eŭropo.

Ekde 1982 aperis en preskaŭ ĉiu

numero de la fakrevuo *Planlingvistiko* rubriko titolita "Slipoj de Etimologia Vortaro de Esperanto", verkita de Tazio Carlevaro. La etimologia kompilaĵo de Carlevaro estis mankhava, ĉar ne estis adekvate dokumentita la historio de vortoj en Esperanto: kiam oni ekuzis ilin kaj kiu enkondukis ilin. Publikigo de la slipoj de Carlevaro haltis pro la ĉeso de *Planlingvistiko*.

Anonco pri baldaŭa apero de konciza etimologia vortaro de Esperanto el la plumo de André Cherpillod troviĝas en numero 19 de *La Gazeto* (decembro 1989). La verko estas nur supraĵe priskribita, do ne estas eble pritaksi ĝian enhavon, amplekson kaj fakan nivelon.

Estas ja stranke, ke la Akademio de Esperanto neniam okupiĝis pri etimologiaj demandoj. Mallonge post mia elekto al tiu institucio en 1983, mi proponis al la prezidanto, d-ro André Albault, ke estu starigita nova sekcio pri etimologio kaj la etimologia vortaro. En sarkasme vortigita respondo la prezidanto rifuzis mian iniciaton. Malgraŭ tio, estante direktoro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro de la Akademio, mi proponis kiel ĝeneralan taskon de la sekcio profundan revizion de *Plena Ilustrita Vortaro (PIV)* kun aldono de etimologioj al la registraĵoj. Mi pravigis tion jene:


"Ne eblaj objeti kontraŭ la aldo-

no de tiaj utilaj informoj pri vorthistorioj en PIV, ĉar precedento ekzistas en samgrandaj etnolingvaj vortaroj. Esperantologoj ofte havas bezonon scii la devenon de vortoj kaj ankaŭ la daton, kiam ili estis uzataj la unuan fojon. Ĉar la etimologia historio de Esperanto ne estas trovebla en alia konsultlibro en Esperanto, devas esti la tasko de la reviziontoj de PIV aldoni tiujn informojn."

Nun la situacio tute ŝanĝiĝis. D-ro Vilborg, post tri jardekoj dediĉitaj al la kolektado de donitaĵoj pri la historio de la Esperanta leksiko, estas preta publikigi la rezultojn de sia esplorado. EVE aperos en la formo de kajeroj; la unua, kiu jam estas eldonita, ampleksas la literojn A ĝis D. Inkluditaj en EVE estas ĉiuj oficialaj radikoj kaj, esceptokaze, aliaj vortoj havantaj rilaton al oficialaj radikoj. Afiksoj, korelativaj vortoj kaj gramatikaj morfemoj estos pritraktitaj en apendico fine de la verko.

La enhavo de la vortartikoloj donas klaran bildon pri la deveno de la Esperanta radiko, kun la dato de ĝia ekuzo en publikigita verko kaj la plej probablaj etimoj. Kaze de devioj de internaciaj vortformoj aŭ specifaj etimoj, aldoniĝas klarigo pri la kialo de la fonetika kaj morfologia aspekto, kiun la radiko akiris en Esperanto. Tre gravaj estas ankaŭ informoj pri semantikaj diferencoj inter la radiko en parencaj fontlingvoj kaj en Esperanto. Por kompara celo troviĝas leksika materialo ĉerpita el ankoraŭ ekzistantaj tekstoj en praesperanto, novaj radikoj en la zamenhafa reformprojekto de 1894 kaj ankaŭ ekvivalentoj en tri postaj planlingvaj projektoj, Ido, Occidental/Interlingue kaj Interlingua/IALA. En kelkaj artikoloj ankaŭ volapukaj vortoj estas cititaj, se ili havas similecon al samsignifaj vortoj en Esperanto.

Por doni pli profundan fonon al



la etimologia bildo, la Esperanta radiko estas lokita en la historian kadron de la hindeŭropaj lingvoj, kio ebligas spuradon al etimoj kaj praetimoj en la latina, helena kaj sanskrita lingvoj kaj, eventuale, al praradikoj en nehindeŭropaj fontlingvoj kiel la araba. Fine, estas resendo al aliaj Esperantaj radikoj, kies historio ekde komuna praradiko, disvolviĝis laŭ diversaj fonetikaj kaj semantikaj vojoj. Tiel, estas eble starigi genealogion por tiel diri, de tuta vortfamilio. Kvankam la kolektado de tiu abundo da lingvistika materialo estis farita laŭ la plej rigoraj kriterioj de faka kompetenteco, ĝia prezentado estas tiel kristalklara, ke laiko povas konsulti EVE sen malfacilaĵoj.

La publikigo de EVE certe okazigos multe da diskutado inter esperantologoj rilate dubajn aŭ nebulajn aspektojn de la etimologio de kelkaj radikoj. La avantaĝo de la kajerforma eldonado estas, ke la ĝustigado de eraroj kaj aldono de nova materialo povas okazi sen granda prokrasto.

Fine, meritas apartan laŭdon Franko Luin pro la tre agrabla grafika aspekto de EVE.

Bernard Golden

Du novaj lernolibroj por svedoj

Börje Lund, Bertil Wennergren & La Ranetoj: *Grodan. Snabbkurs i esperanto, det internationella språket. La Ranetoj. Stockholm 1987. 135 p.*

Ingemar Nordin. *Lernu Esperanton nun! Ilustraĵoj: Anna Nilsson. Grafiko: Johan Carlberg. Motala 1989. 58 p.*

Aperis du novaj lernolibroj de esperanto. Tio estas tre ĝojiga fakto. Estas bone ke regule aperas novaj lernolibroj. Tio signifas ke la bibliotekoj ofte havas eblecon aĉeti novan lernolibron de esperanto. Oni ankaŭ bezonas malsamajn lernolibrojn por malsamaj kursoj kaj lernantoj.

Grodan estas tre "kruta" lernolibro. Ĝi rapide kaj ĝisfunde traktas ĉiujn gravajn gramatikajn regulojn. Tial ĝi estas tre taŭga por ambiciaj lernantoj, kiuj pretas vere labori por lerni la lingvon. Gejunuloj, kiuj uzis la libron en kurso, ke la humuro kaj la rakontoj de la libro estas strangaj.

Lernu Esperanton nun! havas la celon ke lernantoj baldaŭ komprenu kaj uzu la lingvon. En la libro troviĝas utilaj informoj pri la esperanto-movado, kiuj inspiras la lernantojn aktivigi en ĝi.

Bedaŭrinda afero tamen estas ke ambaŭ lernolibroj estas iasence malmalmodernaj. Nuntempe preskaŭ ĉiuj lingvoinstruistoj kaj verkistoj de lingvolemiloj opinias ke estas grave ekde la komenco de la kurso studi utilajn frazojn kaj vortojn. Oni tuj lernu "Kiel vi nomiĝas?" kaj "Kie estas la stacidomo?" En *Grodan* kaj *Lernu Esperanton nun!* male abundas neutilaj frazoj kiel "La rano manĝas la knabon" kaj "Sub la tablo estas kato", kiuj ne estas tre utilaj en praktika situacio.

Klubo kaj personoj, kiuj planas aranĝi kurson, tamen aĉetu ambaŭ librojn, kaj mem juĝu. La librojn donas al ni novajn eblecojn.

La recenzo estas verkita laŭ notoj de diskuto inter Sven Jonsen, kiuj uzis partojn de ambaŭ libroj en kursoj, kaj Leif Nordens storm.

Ture Sventon en Londono

de Åke Holmberg. Tradukita el la sveda de Malte Markheden. Progreso Eldonejo, Motala 1989. Prezo: 73 kronoj.

Ture Sventon fariĝis vera konatulo al la sveda popolo en decembro. Tiam li estis ĉefrolulo en la televida kristmaska kalendaro por infanoj. La televida prezento estis bona, tamen ne tiel streĉa kiel la libro mem.

La aventuroj de Ture Sventon kaj liaj amikoj estas amuzaj ekde la komenco ĝis la fino kaj ĉiam sur-

prizas. Ne temas pri la kutima stilo de detektiva romano. La rakonto estas sen fluanta sango kaj plej multe similas al fabelo. Fluas nur la humuro de Åke Holmberg, kiu mem estas esperantisto.

La libro estas perfekta ankaŭ por komencanto, kiu volas spertigi en Esperanto per agrabla legaĵo en klara kaj facila lingvo.

Beatrix Svenonius

"Vivu Esperantujo"

Kasedo de Georgo Handzlik

Georgo Handzlik estas ankoraŭ unu en la vico de esperantaj kanzonistoj. La 12 kantoj, el kiuj ĉ. la duono originalaj de Handzlik, havas varian tekstenhavon, sed estas plej ofte ŝercaj kaj tro ofte temantaj pri Esperantujo. La sufiĉe fantaziplenaj aranĝoj havas kabaredecan stilon (krom en kelkaj pli molaj baladoj) kaj prezentas riĉan instrumentigon. La plej granda kvalito tamen estas la muziko. Se io mankas ĉe la tekstoj aŭ ĉe la esprimo de la ofte tro milda akompano aŭ de la iom seka voĉo de Handzlik, la belaj kaj kapteblaj melodioj tamen portas la tuton.

Borje Lund

Köp böckerna
på Esperanto-
förlaget
Brunnsgatan 21
111 38 Stockholm

Etimologia

<i>vortaro</i>	80 kr
<i>Grodan</i>	73 kr
<i>Lernu esperanton nun!</i>	55 kr
<i>Ture Sventon en Londono</i>	73 kr

Vizito el Germana DR

Orientgermanaj esperantistoj el Rügen kaj Stralsund utiligis la novajn eblecojn vojaĝi eksterlanden. Komence de marto ili ŝipveturis al Trelleborg, kaj ĝuis programon aranĝitan de surlokaj esperantistoj, i a viziton en lernejo por handikapitaj lernantoj kaj artan ekspozicion.

Curt Vogler

Nova sveda poemaro

Eldona Societo Esperanto eldonos novan eldonon de Sveda Poemaro. Ĝi enhavas la samajn poemojn kiel la unua eldono, sed ankaŭ aliajn, ĝis nun nepublikigitajn, aŭ publikigitajn en revuoj. Tiu, kiu tradukis svedajn poemojn, sendu kopiojn al: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 951 56 Luleå. Indiku el kiu libro vi prenis la svedan originalon.

Libroj en esperanto

En la gotenbarga urba biblioteko ekzistas granda nombro da libroj en esperanto. Ĉiujare oni aĉetas novaj dank' al testamento de E S Nilsson. Ĉiu rajtas mendi la librojn ĉe sia loka biblioteko. Vi povas mendi la katalogon "Böcker på esperanto" telefonante al Göteborgs stadsbibliotek, facksal 7, 031-810480.

Vigla laboro en Malmö

Klubo esperantista de Malmö vigle laboras. Ni citas el la jarraporto por 1989. Okazis kvar klubkunsidoj, sep estrarkunsidoj kaj dudek unu aliaj aranĝoj. Radio Esperanto pro-

duktis 50 programojn. Laboris kvar studrondoj printempe kaj kvar aŭtune. Kune partoprenis 81 personoj. La klubo diskutis proponi amikajn kontaktojn kun la esperantistoj en Tallinn apud la nunaj kontaktoj kun Samarkando kaj Hamburgo. La kluba gazeto aperis sepfoje. La neta rezulto de loterio estis 12183 kronoj. La kluba biblioteko kreskis per 17 libroj kaj nun entenas proksimume 3000 librojn.

La Espero gratulas pro la vigla laboro.

La loterioj tre sukcesaj

Tre sukcesaj por la ekonomio de Sveda Esperanto-Federacio estis la loterioj, lerte aranĝitaj de Lennart Svensson en Filipstad.

En 1989 loterio donis gajnon de 47 493 kronoj, en 1990 loterio donis 40 567. Aldoniĝos la rezulto de vendado dum la kongreso en Karlskoga.

Prelegoj pri Pollando

Zofia Banet-Fornalowa faris prelegan turneon en lernejoj en Motala inter la 7-a kaj 15-a de marto. La prelegojn interpretis Karl Blomkvist kaj Kerstin Rydén. La elekto de temoj montriĝis vere trafa. Prezento de ekologiaj aferoj kiel monda, plej grava nuntempe problemo, kiun frontas la homaro, vekis grandan intereson inter la junularo kaj geinstruistaro. Konsciiĝo pri dependo de ĝia solvo de ekonomiaj prioritatoj kaj politika kunlaboro rimarkigis aŭ atentigis pri nepro de mondskala kunlaboro.

Aparte viglan intereson vekis la nepro de intima kunlaboro inter Svedio kaj Pollando en realigo de kelkaj mediprojektoj, ĉefe la "Projekto Wisla" (Programo Vistula), sed



ankaŭ la dua temo "Direktoj de politika kaj ekonomia evoluoj en Pollando" montriĝis por la aŭskultantoj interesa. Atestis pri tio diversaj trafaj demandoj de la gejunularo.

Kelkaj ĵurnaloj faris intervjuojn, i.a. Motala Tidning, Norrköpings Tidning kaj Östgöta Correspondenten.

Gravas ankaŭ, ke oni ligis kontakton kun Pol-Sveda Asocio pri Protekto de Medio (SPM), kies kunvenon oni partoprenis la 10-an de marto en Linköping.

Zofia Banet-Fornalowa

Eldona Societo jarkunvenis

Dum la kongreso en Karlskoga ankaŭ Eldona Societo Esperanto jarkunvenis. Kiel kutime la jarraporto montris nur gajneton. La dumjara vendado finiĝis je 80028 kronoj.

Dum la jaro estis represita *Lilla Ordboken* kaj nove eldonitaj *Orn la ruĝa* kaj la unua kajero de *Etimologia Vortaro de Esperanto*. La laboro pri la nova sved-esperanta vortaro eniris sian lastan fazon.

Post multjara dankinda servado en la Eldonejo Anita Dagmarsdotter retiris sin kaj nove elektita estrarano estas Lennart Lagerkrantz, Falun. Kaisa Hansen elektigis anstataŭanto por du jaroj.

Moskovskie novosti

Den kända tidskriften *Moskovskie novosti* kommer att komma ut på esperanto. Det stora intresset som esperantister världen över visade för provnumret bidrog till att beslutet om esperantoupplagan slutligen togs. *Moskvaj novaĵoj*, som tidskriften kommer att heta på esperanto, har gjort sig känd som det främsta språkröret för perestrojkan.

Tre års korrespondensstudier

Att man kan studera esperanto på universitet är ingen nyhet. Det är möjlig vid tiotals universitet världen över. Eötvös-universitetet i Budapest är däremot ensamt om att erbjuda tre års studier i esperanto per korrespondens. I september

1990 börjar studierna med en vecka i Budapest. Kursen är till för sådana som redan har filkand, fillic eller motsvarande. Studierna avslutas med avhandlingsskrivande och leder till magister- eller doktorsgraden.

Information lämnas av:
Eötvös Universitato,
Rektori Hivatal Oktatási Osztálya,
Szerb u. 21-23 I/28,
H-1053 Budapest, Ungern.

Asocio por religia historio

Fondigis asocio por religia historio, t e la scienco pri diversaj religioj: Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj (ASISTI, Ch. Lavarenne, Les Marguillans, Lignane, F-13540 Puyricard, Francio) ASISTI eldonas la revuon *Asistilo*, kiu estas revuo pri diversaj religioj kaj religiaj aferoj. Ĝi tamen estas neŭtrala, do ne propagandas iun ajn religion.

Kalendaro

Tillägg till kalendrarna i *La Espero* 1990:1 och 1990:2:

AUGUSTO

19-26 **Artaj kursoj** (Esperanto-Centro Halle, Schleiermacherstrasse 37, DDR-4020 Halle, Germana DR)

25 aŭgusto - 1 septembro **Internacia semajno**, Habère-Poche, Haute-Savoie (Esperanto, 5 rue du Docteur Roux, F-34000 Montpellier, Francio)

SEPTEMBRO

15-22 **Internacia semajno**, Sete (Esperanto, 5 rue du Docteur Roux, F-34000 Montpellier, Francio)

NOVEMBRO

5-11 **8-a Internacia Metodika Seminario**, Kaunas, Litovio (Litova Esperanto-Asocio, 233000 Kaunas-C, ab. k. 167, Litovio)

DECEMBRO

10 decembro - 7 januaro **Unua Afrika Kongreseto** Togolando, Benino, Ebura Bordo (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

ofte:

Diversnivelaj Esperanto-kursoj: Esperanto-Centro Halle, Schleiermacherstrasse 37, DDR- 4020 Halle.

Kurt Lindström

fidela, 85-jara stokholma samideano, mortis la 25-an de februaro. Bonkora kaj malavara, li dediĉis sian vivon al Esperanto. Inter alie li subtenis multajn amikojn en foraj nepagipovaj landoj per sendado de libroj. Li estis unu el la plej lertaj esperantistaj filatelistoj en Svedio, kaj li iniciatis kaj mone subtenis la eldonadon de pluraj svedaj E-poŝt-stampoj. Oni devas danki liajn bonajn kontaktojn kun la Poŝta Muzeo, ke oni aranĝis tie la Esperanto-ekspozicion dum la jubilea jarkongreso en 1987.

Anna-Greta Strömne

Veckoslutskurs

i Studiegården,
Skövde,
29-30 septembro.
Start båda dagarna
kl. 10.

Tre stadier: Nybörjare,
Fortsättnings-,
Konversations-
Vi bjuder på kaffe och
smörgåsar.
Ingen deltagaravgift.
Anmälan före
den 14 septembro
till tel. 0500/260 31.
Begränsat antal
övernattningar (60 kr).

Skövde
Esperantoklubb

Plezurul' dancas gavoton kun la kvin sentumoj

La vidado

Ja neniŭ maltoleru mian ĝuon de l' vidivo.
Belaj rozoj, belaj floroj estas spicoj de la vivo.
Miaj ravoj: Belaj faroj,
belaj moroj, belkoloroj;
bela plumo, bela besto,
bela ino, bela vesto.

La aŭdado

Ja neniŭ maltoleru mian ĝuon de l' aŭskulto.
Gaja kant' kaj bona ŝerco estas mal' de sensinsulto.
El trumpeto kaj tamburo
venas granda aŭdplezuro.
Liuto, harpo kaj hobojo
kontribuas al la ĝojo.

La gustumado

Ja neniŭ maltoleru mian ĝuon de l' malsato.
Gusta manĝ' kaj bona trinko estas benoj por palato.
Frit', boligo, rost' kaj bako –
ĉiuj servas al stomako.
Poste trink' de dolĉa vino
estas de l' regal' kulmino.

La flarado

Ja neniŭ maltoleru mian ĝuon de l' odoro.
Per parfum' puriĝas sango, havas novan forton koro.
Oliban', hisop' kaj stakto
freŝimpresas al olfakto.
Rozole-benzo-tinkuro
helpas al vizaĝa puro.

La tuŝado

Ja neniŭ maltoleru mian ĝuon de l' rafino.
Ama lud' kaj amhumoro estas de l' natur' destino.
Koka kluk' kaj birdrukulo,
ŝafa blek' kaj lupululo –
cel' de ĉio en la fino:
ke proksimiĝu vir' al ino.

Samuel Columbus (1642-1679)
(Trad. PAF)

Interna kvalitavigo estas la vojo!

Bertilo Wennergren tute pravas en sia artikolo "Ĉu ni estas sur la ĝusta vojo?" (La Espero 6/89). Plej grava estas la altigo de la interna kvalito de nia movado. Tro multas ne nur "eternaj komencantoj" sed ankaŭ ni, kiuj ne plu estas komencantoj, sed aliflanke ankaŭ ne plene posedas Esperanton. Nia nuna lingva nivelo ne taŭgas! Pli indas koncentri niajn fortojn al riparo de tiu manko, ol foruzi nian tempon kaj energion por varbado kaj komencaj kursoj.

Sed kion fari, pli konkrete? Laŭ mi estus bezonata la jeno:

1. Eldono de novaj, pli aktualaj, vortaroj. Antaŭ ĉio ni bezonas alian sved-esperantan vortaron ol la nunan, presitan en la jaro 1934!

2. Eldono de lernolibroj por daŭrigantoj. Ni havas librojn por komencantoj kaj postkomencantoj, sed ne por tiuj, kiuj jam iom bone posedas Esperanton, sed volas sisteme vastigi sian vortprovizon kaj profundigi sian lingvoscion. Ekzistas la tre bona libro "Kiel diri?". La bezonata eble estas libro de tekstoj, bazitaj sur la tieaj esprimoj, temon post temo.

3. Aranĝado de kursoj por daŭrigantoj. La kursoj de la popolaltlernejo de Karlskoga verŝajne estas bonaj, sed ĉiuj esperantistoj ne povas foresti kelkajn semajnojn. Do krom tio estas bezonata studrondoj en la kluboj. Eble eĉ tiaj studrondoj povus verki ĉapitrojn por la antaŭe menciita tekstlibro por daŭrigantoj.

Dankon, Bertilo, por tre pripensindaj vidpunktoj!

Jan Milld

Nils A NILSSON
Eriksdalsgatan 7 B 1tr
21216 MALMÖ

Esperantoförbundet, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

Bertil Wennergrens
Nya
Esperanto-
kompendium

har nu kommit!
Helt omarbetat, större format, mer omfattande.
Pris: 72 kr.

Obs!

Fram till den 31 augusti
kan du få det till rabattpris:

<i>enstaka exemplar:</i>	<i>12,5% rabatt (= 61 kr/st)</i>
<i>10 exemplar eller mer:</i>	<i>25% rabatt (= 54 kr/st)</i>

Priserna är inklusive moms och porto.

Beställ från
Esperantoförlaget, Box 7502, 200 42 Malmö